Starto 210

**El la enhavo:**

35 jaroj de ĈEA
ĈESAT
Karel Sittauer
Geraldo Mattos
Vojoj de kuraĝo
Enciklopedio de eŭropaj lingvoj
Studoj en Bydgoszcz
SAT-kongreso

# 1
# 2004

**ORGANO DE ĈEHA ESPERANTO-ASOCIO**



**Legi dum unu spiro / unuspire**

*(El Ilustrita frazeologio)*

☆ Starto ☆
organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 4-foje jare. Abono 10 eŭroj (+ 2 eŭroj aerpoŝte), **rete Starto:** malovec.starto@clavis.cz, www.clavis.cz/starto, **rete ĈEA:** cea.polnicky@quick.cz (sekretario) podhradska@volny.cz (prezidanto) www.kuk.cz/cea/

**Komercaj anoncoj:** 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, triobla reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

**Membrokotizoj:** A 300 Kč, B 200 Kč, C 100 Kč, D 500 Kč, Z 1000 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

**Korespondaj kursoj:** 600 Kč komencantoj, 700 Kč progresintoj. Aliĝoj: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratíškovice, melicharkova@quick.cz

**Libroservo:** Zdeněk Pluhař, Lamačova 658/6, 15200 Praha, tel. 251 817 732, m.pluharova@worldonline.cz

**Sekcioj de ĈEA:** junulara, katolika, kristana, blindula, medicina, fervojista, ŝakista, SAT-amikara, pri informadiko

**Komisionoj de ĈEA:** pedagogia, gazetara-informa

**Asocia adreso:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, c/o Pavel Polnický, Lesní 150/VI, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea.polnicky@quick.cz

**IČO de ĈEA:** 00 44 30 34

**Banko-konto de ĈEA:**
3330 021/0100,
Komerční banka Poděbrady

**ISSN 1212-009X**

**Eltondaĵojn el gazetoj por la gazetara-informa komisiono kolektas (výstřižková služba)**: Jarmila Čejková, Malý Koloredov 1538, 738 01 Frýdek-Místek

**Komitato de ĈEA:**

**Prezidanto:** Věra Podhradská, Poříčí 1, 603 00 Brno, tel. 543 233 047, podhradska@volny.cz (vnější a vnitřní vztahy, čestní členové)

**Vicprezidanto (ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio):** Lucie Karešová, Havlíčkovo nám. č. 1, 130 00 Praha 3, tel. 222 780 677 (zápisy, koncepce, metodika)

**Vicprezidanto (komitatano A de UEA):** Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201, fakso 257 712 126 chrdle@kava-pech.cz (mezinár. vztahy, UEA, vydavatelská činnost)

**Sekretario**: Pavel Polnický, Lesní 150/VI, 290 01 Poděbrady, tel./fax. 325 615 651, cea.polnicky@quick.cz (sekretariát, členská základna, účetnictví)

**Kasisto:** Jindřich Ondráček, Bubenská 17, 170 00 Praha, tel. 220 879 386 (konference, sjezd)

**Komitatano:** Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, 568 02 Svitavy, 461 532 257, dvorakovalibuse@quick.cz,dvorakova.libuse@khspce.cz (kluby a kroužky)

**Komitatano:** Jiří Tomeček, Dr. Bureše 3, 370 05 České Budějovice, 602 611 584, jirka.tomecek@post.cz (sekce, komise)

**Kontrolgrupo de ĈEA:** Prezidanto: Josef Hron, Bohdanečská 68, 530 09 Pardubice, josef.hron@vakpce.cz, tel. 466 401 942; Věra Šlahařová, Jana Zajíce 2873/22, 400 11 Ústí n. L., slaharova.v@kr-ustecky.cz; Jiří Souček, Mečislavova 223/8, 140 00 Praha 4, soucek@komercpoj.cz

**Redaktoro de Starto:** Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 547 240 690, starto@clavis.cz

**Kontrollegis:** L. Dvořáková, V. Kočvara, M. Pastrňák

**Esperanto-muzeo:** Jiří Pištora, Městské muzeum, Staré nám. 78, 560 02 Česká Třebová, muzeum.ct@worldonline.cz

**Redakto-fermoj**: 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.

# Ĉeĥa Esperanto-Asocio 35 jaroj

En la tagoj 29.-30. 3. 1969 realiĝis en Brno (kulturejo Besední dům) konstitucia kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Entute 162 delegitoj el 101 rondetoj elektis kiel prezidanton Josef Vítek, aprobis la statuton kaj nomumis la unuajn honorajn membrojn. Samtempe komencis funkcii nia gazeto Starto, kies 210-an numeron vi ĵus eklegis.

**Pasinteco.** Se ni rerigardas la 35 jarojn, ni povas rememori multajn interesajn aranĝojn, ekz. somerajn Esperanto-tendarojn (Lančov, Sebranice, Nekvasovy, Skokovy, Plasy), kulturajn festivalojn (Pardubice, Opava, Ústí n. L.), fakajn seminariojn AEST (nun daŭrigataj kiel KAEST), ĉiujarajn asociajn konferencojn (aŭ kongresojn, se estas elektata nova asocia estraro), diversajn seminariojn aŭ turismajn aranĝojn (nialande kaj eksterlande). Certe la kulmino estis la 81-a UK Prago en 1996. Dum niaj asociaj kongresoj estis nomumitaj 56 honoraj membroj. Inter niaj sekcioj la plej aktivaj estas la katolika, fervojista, blindula kaj mem-stariĝinta AEH.

Sed krom rememoroj ni povas fieri pri pli ol 200 publikaĵoj, kiujn eldonis ĈEA, ĝiaj kluboj, memstaraj firmaoj (SPN, KAVA-PECH, Chronos, Klavis) aŭ kiuj aperis eksterlande, sed verkitaj de ĉeĥaj esperantistoj. Kelkaj libroj estis tradukitaj el Esperanto en la ĉeĥan. Krom Starto aperadis ankaŭ klubaj kaj sekciaj bultenoj.

**Estanteco.** Post la politikaj ŝanĝoj en 1990 ŝanĝiĝis ankaŭ la situacio de nia asocio. Parte favore, parte malfavore. Dum socialismo ni havis 2500 membrojn kaj ricevadis ĉiujare ministerian dotacion (ĉ. centmil Kčs), la Ŝtata Pedagogia Eldonejo eldonis por ni lernolibrojn (Kilian, Cink, Barandovská) kaj vortaron (Hromada). Nia asocio eldonis ĉirkaŭ 90 titolojn, plejparte broŝuretojn. Ĉiujare aliĝis 600 novaj membroj kaj la sama nombro eksiĝis. Kelkcent personoj aliĝis al korespondaj kursoj, plenplena estis SET Lančov.

Post falo de la fera kurteno la komunikado kun la tuta mondo faciliĝis same kiel turismo, kio malgravigis la rolon de Esperanto. La homoj komencis dediĉi sin preskaŭ nur al la angla, multaj ekĉasis karieron, aliaj perdis laboron, intereso pri Esperanto malkreskis kaj proporcie komencis fali nia membrobazo. Venis novaj amuziloj: poŝtelefonoj, komputiloj, interreto (ligitaj ĉefe kun la angla lingvo). La tradicia kluba vivo de esperantistoj ne estas alloga por la nuntempaj gejunuloj (ankaŭ aliaj lingvoj ne havas tiajn klubojn).

Sed la komputiloj ebligis levi la tipografian nivelon de niaj eldonaĵoj, eksponi multajn tekstojn en la interreto

(beletraĵojn, vortarojn, kursojn, enciklopediojn, prezentojn de organizoj ktp.) kaj rapide komuniki kun eksterlandaj esperantistoj per elektronikaj leteroj. Ni povas vojaĝi al eksterlando sen specialaj permesoj, publikigadi verkojn sen cenzuro (aperis 110 publikaĵoj).

Ankaŭ UEA spertas malkreskon de la membraro, sed samtempe leviĝon de prestiĝo de Esperanto (ekz. la internacia PEN-klubo akceptis Esperanton kiel literaturan lingvon, Umberto Eco dediĉis al la problemo sian faman libron Serĉado de la perfekta lingvo, aperinta ankaŭ ĉeĥe k.a.).

**Futuro**. La nuntempa movado spertas fenomenon, ke multaj homoj, lernantaj Esperanton, ne volas esti membroj de niaj asocioj, eĉ ne movadanoj. Sed simile tiuj, kiuj lernas angle, germane, itale aŭ portugale, ne deziras propagandi tiujn lingvojn, nek membriĝi en lingvaj kluboj aŭ asocioj. Estas normale lerni fremdan lingvon por ĝin utiligi, nenormale por ĝin propagandi. Nia movado allogas propagandemulojn, ofte eĉ iomete frenezetajn, sed la futuro de la movado verŝajne dependos de tio, kion ni kapablos proponi al normaluloj, kiuj volas Esperanton utiligi, sed propagandado ilin ne interesas.

Onidire en Hungarujo ĉiujare kelkcent altlernejanoj submetiĝas al ekzameno pri Esperanto por plenumi la leĝon de dua mondlingvo apud la angla (Esperanto plej facile helpas plenumi la leĝon), sed ili absolute ne deziras esti movadanoj, nek kreskigi la membrobazon de HEA, nek batali por ĝenerala enkonduko de Esperanto. Se ili trovus riĉan literaturon de sia fako esperantlingve, ili ĝin certe utiligus, sed ili neniel emas kontribui al tiu celo.

Multaj homoj eklernas Esperanton laŭ kursoj en interreto kaj serĉas tie ankaŭ eblojn de praktika apliko. Ankaŭ ili ne volas esti movadanoj, tiom malpli asocianoj. En nia malgranda lando milionoj da homoj studas fremdajn lingvojn, tute ne intencante ilin propagandi nek ie membriĝi. Fakte nur kelkaj profesiuloj prizorgas lernolibrojn kaj vortarojn, sed neniu klopodas asociigi kursanojn.

Eble nia propagando estas malsukcesa tial, ĉar ĝia celo estas akiri novajn membrojn por niaj organizoj, produkti novajn movadanojn, dum la publikon interesas akirado kaj interŝanĝo de informoj. Ni alkutimiĝis taksi niajn sukcesojn laŭ varbitaj novuloj, ne laŭ eblo utiligi la lingvon praktike.

Tial ni perdas tiujn homojn, kiuj ne volas asociiĝi, sed deziras akiradi per Esperanto enciklopediajn informojn pri diversaj neesperantistaj temoj kaj fakoj.



# ROZPOČET ČES

| Příjmy: | Rok 2003: plán: | Rok 2003: skutečnost: | Rok 2004: návrh: |
|---|---|---|---|
| členské příspěvky | 90 000.- | 85 760.- | 90 000.- |
| prodej knih a mat. | 20 000.- | 25 692.- | 20 000.- |
| písemné kurzy | 5 000.- | 2 400.- | 3 000.- |
| Starto předplatné | 500.- | 1 100.- | 900.- |
| úroky v bance | 500.- | 118.- | 100.- |
| dary členů | 20 000.- | 13 293.- | 15 000.- |
| konference ČES | 55 000.- | 79 110.- | 65 000.- |
| OSIEK | 2 000.- | ---- | 2 000.- |
| UEA | 40 000.- | 41 209.- | 40 000.- |
| sekce a kluby | 30 000.- | 78 145.- | ---- |
| konverz. kurzy | 10 000.- | 14 429.- | 10 000.- |
| **celkem** | **273 000.-** | **341 256.-** | **246 000.-** |

Výdaje:

| | | | |
|---|---|---|---|
| režijní materiál | 5 000.- | 2 732.- | 4 000.- |
| náklady na prodej knih | 5 000.- | 13 519.- | 5 000.- |
| nákup knih (+ fa za PIV) | 40 000.- | 42 366.- | 4 000.- |
| cestovné | 20 000.- | 16 258.- | 18 000.- |
| poštovné | 5 000.- | 3 317.- | 5000.- |
| telefon a internet | 10 000.- | 8 661.- | 8 000.- |
| funkční odměny | 7 000.- | 6 120.- | 7 000.- |
| nákup služeb | 35 000.- | 37 258.- | 38 000.- |
| daně | 8 000.- | 6 790.- | 7 000.- |
| poplatky bance | 8 000.- | 7 562.- | 8 000.- |
| konference ČES | 45 000.- | 69 240.- | 60 000.- |
| sjezd ČES (doplatek) | ---- | 20 250.- | ---- |
| Starto - tisk a exp. | 75 000.- | 62 316.- | 75 000.- |
| písemné kurzy | 4 000.- | 450.- | 2 000.- |
| odměny | 3 500.- | ---- | 2 500.- |
| muzeum Č. Třebová | 2 500.- | 2 500.- | 2 500.- |
| nájem Běch. + Dobř. | 27 000.- | 26 489.- | 27 000.- |
| dary a reprezentace | 5 000.- | 4 672.- | 4 000.- |
| konverzační kurzy | 10 000.- | 11 362.- | 7 000.- |
| UEA | 15 000.- | ---- | 36 000.- |
| sekce a kluby | 8 000.- | 52 004.- | ---- |
| **celkem** | **338 000.-** | **393 866.-** | **320 000.-** |

## Několik poznámek k rozpočtu

(viz str. 5)

Pozorný čtenář Starta jistě zaznamená některé rozdíly mezi skutečností za rok 2003 a rozpočtem na rok 2004. Jedná se především o část výdajovou, kde je v nákupu knih zahrnuta i fa. za PIV ve výši Kč 37 500.- která byla uhrazena zač. roku 2003, ale tržby byly již v roce 2002. Totéž se týká fa. za ubytování na sjezdu v r. 2002, která byla také placena na začátku r. 2003. Rovněž u nákladů na Starto přišla fa. za č. 4/03 až v lednu. Proto je počítáno v rozpočtu s částkou za 5 čísel. U této položky by se měl projevit značný rozdíl po loňské změně tiskárny, jejíž cena je nižší o 2 000.- Kč za jedno číslo časopisu.

Pokud se týká rozdílu mezi příjmy a výdaji (-74 000.- Kč) je nutné započítat i počáteční stav hotovosti k 1. 1. 2004 ve výši 72 564.- Kč. Předpokládáme také zvýšenou částku u členských příspěvků po jejich navýšení.

Výbor svazu se svízelnou finanční situací pravidelně zabývá a hledá další možnosti úspor, ale i zvýšení příjmů. To se nám povede pouze s Vaší pomocí a pochopením. Stále nám klesá počet členů a mnohdy je to jen proto, že se nikdo v místě klubu nebo kroužku o tuto práci nestará. Prověřte svoji členskou základnu.

*Pavel Polnický*

## Upozornění

členům svazu. Vzhledem k tomu, že nový příspěvkový řád svazu, schválený na konferenci v Litomyšli, byl uveřejněn až ve Startu č. 4/03, rozhodl výbor ČES, že platby poukázené do konce roku 2003 budou přijaty i v původní částce. To znamená, že platby došlé po novém roce musí odpovídat novému příspěvkovému řádu. Je tedy nutné doplatit případný rozdíl co nejdříve. Děkujeme Vám za pochopení a těšíme se na další spolupráci.

*Výbor ČES*

## Sukceso de Esperanto en Bruselo

La brusela "Restoracio Esperanto" preparis novan prezenton kun nova menu-karto.

La restoracio estas en eta strato, kiu kondukas de la Centra Stacidomo al la Centra Poŝtoficejo kaj apud unu enirejo de la Reĝaj Galerioj Sankta-Hubert. Samtempe ĝi estas restoracio de granda hotelo en la centro de la urbo. Al tiu, kiu deziras skribi por gratuli: (france, nederlande, angle, hispane) S-ro Paolo Jarmillo F&B Manager NH Grand Place Aren berg Hotel, Rue d'Assaut 15 Stormstraat, BE-1000 Bruselo, Belgio
Rete:

foodbeveragenhgrandplacearenberg@nh-hotels.be de Germain Pirlot
Rete: gepir.apro@pandora.be

# Esperantisto Karel Sittauer

Esperantisto Karel Sittauer la 27-an de januaro centjariĝus. Esperanton li eklernis dum la studado de gimnazio en la urbo Vidnava, poste li fariĝis membro de Germana Esperanto-Ligo en Liberec. De burĝa lernejo en Třebíč li transiris al eksperimenta burĝa lernejo de Baťa en Zlín, kie li instruis la germanan kaj la francan. Kiam la respubliko estis minacata de nazioj, li kiel ĉeĥa germano organizis skriban proteston kun siaj gekolegoj kontraŭ la perfidulo Konrad Henlein. Post okupacio de nia respubliko pere de nazioj, oni translokigis lin kiel instruiston al unuklasa germana lernejo en germanlingvan regionon ĉe Znojmo. De tie li bedaŭrinde foriris militservi. Unue al Kroatio. Ĉar li kritikis militon, li estis tuj transportita al la rusa fronto. En ukraina urbo Ternopil li renkontis hazarde sian iaman E-korespondanton. Laŭ nazioj estis lia renkonto taksita kiel malamika afero kaj li kiel averto por ceteraj estis la 9-an de marto 1944 ekzekutita.

Post la milito, en 1947 fariĝis esperantisto lia filo Pavel Sittauer, kiu volus igi fina la ideon de eterna paco helpe de Esperanto, por ke neniam plu kresku la infanoj sen siaj patroj.

## Rememoro pri SET Lanĉov kaj Červená

Aŭtune en 1956 mi finis la soldatan kemian lernejon en la urbo Jaroměř kaj revenis kiel kemia instruktoro al mia regimento en Písek. Mi estis envicigita al komandanta taĉmento de la 1-a grupo. Mi instruis soldatojn kontraŭradian kaj kemian programon en trupoj de la regimento. Dum libera tempo mi kune kun kelkaj amikoj vizitadis Esperanto-klubon en la urbo Písek, kiun gvidis bona amiko Libor Křivánek kun sia edzino Radka.

Foje posttagmeze venis al mi deĵoristo kun ordono tuj viziti la ĉefon de la dua grupo kapitanon Kořínek. Apenaŭ mi fermis la pordon kaj prezentis min laŭ la soldataj reguloj, diris kapitano Kořínek: "Sidiĝu, serĝento, kaj liberigu vin." Li ŝlosis la pordon, por ke neniu ĝenu nin, kaj proponis al mi bonan turkan kafon. Mi kun intereso atendas, kio okazos: "Vidu, serĝento, mi scias, ke vi estas esperantisto kaj regule vizitadas urban E-klubon. En la kurso studas mia edzino. Kaj en lasta tempo ŝi ofte ricevadas leterojn de viroj de diversaj landoj. Kaj mi tute ne scias, kion ili skribas al ŝi. Pro tio mi volus eklerni Esperanton. Mi scias, ke vi profesie estas instruisto. Ĉu vi helpos min?" Do, de tiu tempo mi lin instruis. Ĉar li estas vere inteligenta homo, li post kelkaj semajnoj jam parolis en Esperanto. Post iu tempo li kun ĝojo rakontis al mi: Vidu, Paŭlo, mi surprizis mian edzinon, kiam mi alparolis ŝin Esperante! Kaj mi pli bone parolas ol ŝi. Unuafoje ni trinkis krom la tradicia kafo ankaŭ alkoholaĵon.

Fine de oktobro finiĝis mia soldatservo kaj mi tuj komencis organizi venontan SET-on, la unuan en golfo de Lančov (1958). Granda estis mia surprizo, kiam Libor Křivánek informis min, ke ankaŭ la Klubo en Písek organizos SET-on apud Červená ĉe Vltava kaj ke ĝin konstruos soldatoj el Písek. Gvidanto de SET en Červená estis fama esperantisto Vlastimil Kočvara.

*Pavel Sittauer*

## Esperantistoj en Ĉeĥa Televido

En televida AZ-kvizo s-ano Jan Bína el Brno gajnis tri rondojn, s-anino Květa Krajíčková partoprenis konkurson *Máte padáka* (proksimuma signifo: *Vi estas katapultita!*), en kiu la konkursantoj unue devas rapide respondi kvizajn demandojn kaj poste per balotado elĵetas unu el ili laŭ diversaj strategioj. Ŝi estis katapultita antaŭ la finalo.

## Esperanto en Ĉeĥa Radio

Pavel Novák, varsovia raportisto de la programo Radiožurnál (Radioĵurnalo prezentas raportojn el eksterlando), vizitis Bialistokon kaj sub titolo **En la lulilo de Esperanto** elsendis la 20-an de decembro 2003 siajn impresojn.

Li vizitis la Bialistokan Esperanto-klubon, kie lin bonvenigis surskribo: *Se vi volas monon, lernu la anglan, se vi volas amikojn - lernu Esperanton!* La klubanoj priskribis al li la biografion de Zamenhof kaj montris Zamenhof-straton, kie iam staris lia naskiĝdomo. Nun tie estas infanĝardeno, kie la infanoj lernas Esperanton. Sesjara knabeto prezentis, kiel li scias kalkuli ĝis tridek. Sur la apuda domo pendas memortabulo kun surskribo, pola kaj Esperanta: *Ĉi tie staris domo, en kiu la 15-an de decembro 1859 naskiĝis kreinto de Esperanto D-ro Ludoviko Zamenhof* (ne estas preciza citaĵo - rim. de red.).

En la Bialistoka biblioteko P. Novák trovis eĉ *Poŝrakontojn* de Karel Čapek.

La riporto finiĝis per ekzemplo de esperantista amikeco: kursgvidantino E. Karczewska telefonis al delegito en Barcelona, ke ŝi bezonas por 50 ekskursantoj tranoktadon en Barcelono, Madrido kaj Granado. Ŝi ricevis ĝin por tre avantaĝaj prezoj.

La riporto poste estis disponigita en interreto, eĉ je du adresoj:
http://www.rozhlas.cz/svet/portal/_zprava/98731
http://www.zav.cz/Bulletin/esp_kolebka.htm

## Interesa ĉeĥa TTT-ejo pri Esperanto

La lasta supre menciita ret-adreso prezentas ankaŭ aliajn interesajn artikolojn pri Esperanto. La ĉeĥlingvajn (Esperanto - jazyk Evropy?, Esperanto - historie, současnost, rozvoj, Esperanto - Komunikace budoucnosti) oni trovas ĉe http://www.zav.cz/indexcz.html, kaj la esperantlingvajn ĉe http://www.zav.cz/Bulletin/Esperanto/esp_esp.htm

## Sennaciulo, La Migranto

*Grava atentigo pri peranteco por SAT kaj ĝia organo Sennaciulo; pri peranteco por La Migranto organo de Naturamika asocio.*

Mi informas vin pri pageblecoj:

**SAT:** La pagojn membroj kaj interesiĝantoj sendu al bankokonto ĉe ČSOB 122443440/0300, varia simbolo (v.s.) estu prefere membronumero de SAT aŭ telefonnumero de la paganto, se li ne estas membro de SAT, konstanta simbolo (k.s.) 0379. Kompreneble eblas ankaŭ uzi simplan poŝtpagilon kaj pagi al mi aŭ pagi pere de banko al la menciita bankokonto. Ĉi momente ankoraŭ ne estas konata al mi kotiztabelo por 2004.

**La Migranto:** Abonpago pro 2004 estas 110, - Kč. Maniero por pagi: bankokonto 122443440/0300, v.s. telefonnumero de la paganto, konstanta simbolo 0379. Eblas pagi per simpla poŝtpagilo al mi. Informoj aperos ankaŭ en Sennaciulo kaj en La Migranto.

Václav Stibůrek, J. Franka 1731, 256 01 Benešov, tabl. 317721018, mobil. 608516206, stiburek.v@c-mail.cz

## Muzeo Šumava

Esperantajn paĝojn vi trovos http://www.retour.cz/Muzeum-Sumavy/esperanto/kasperske-hory.htm

La paĝojn prizorgis s-ano Jiří Pěnek.

## Korespondi deziras

Ing. František Ančinec, Dolní 28, 796 01 Prostějov, 50-jara ekonomo

## Informoj el Slovakio (SKEF)

La organizo havas nova adreson: Slovaka Esperanto-Federacio, P. O. BOX B-152, SK-012 41 Žilina

La kongreso de SKEF okazas en Nové Mesto nad Váhom (28.-30.5.2004). Aliaj aranĝoj:

6.3. Konferenco de OSES Bratislava
24.4. Turisma renkontiĝo Piešťany
26.6. 7-a Esperanta bazaro, Dunajská Streda
20.-27.11. filmfestivalo, Bratislava

## Sendu bildkarton

al E-klubo en Saint Etienne, kiu baldaŭ festos centjariĝon kaj volas aranĝi ekspozicion de bildkartoj akiritaj per Esperanto. La kartoj povas esti elektronikaj.

Verda Pigo, p/a Pierre Gröllemund, 51 rue Vaillant-Couturier, 420 00 St. Etienne, Francio, verdapigo@yahoo.fr

## 10 jaroj de Esperanto-muzeo en Česká Třebová

Belan longan ĉehlingvan artikolon pri la muzeo publikigis s-ano Jiří Pištora en loka informilo. La artikolo estas legebla ĉe la adreso http://www.zpravodaj.ceskatrebova.cz/45_03clanky/47_esperanto_muzeum_10let.htm

## Studentoj pri Esperanto

Ĉe Katedro de Slavaj Lingvoj kaj de Ĝenerala Lingvistiko de Okcidentbohemia Universitato en Pilzeno aperis retaj paĝoj pri Esperanto: http://www.ksi.zcu.cz **kaj** http://www.ksi.zcu.cz/zpravy/seminarka2.doc

## Konkurso de infandesegnoj

La esperantistoj en la franca Vendomois aranĝas internacian konkurson de infandesegnoj. La temo: **ĝardenoj**. Formato de papero: A3. La aĝokategorioj: ĝis 7 jaroj, 7-10 jaroj, 10-14 jaroj. Limdato: ĝis 25. 5. 2004.

Sur la dorsan flankon de papero skribu koncizan titolon de la desegno, la aĝon kaj adreson de la infano.

La desegnojn sendu al adreso:

Esperanto en Vendomois
Les Monts
FR-41360 Lunay
Francio

## Internacia Semajno ĉe Mediteraneo

(21.-28. 8. 2004)

proponas perfektiĝi en Esperanto kaj samtempe ferii en la havenurbo Sète.

Aliĝoj: Espéranto culture et progrés, 5, rue du docteur Roux, FR-34090 Montpellier, if.passarella@free.fr
http://perso.wanadoo.fr/nikolao/esperanto.html

## Esperanto en niaj bibliotekoj

La plej grandaj ĉeĥaj bibliotekoj kutime prezentas en la interreto sian katalogon kaj tiel ni povis kontroli, kiom da libroj en Esperanto ili posedas kaj proponas al la legantoj. Kompreneble, ne ĉiuj katalogoj estas kompletaj en elektronika formo kaj ne ĉe ĉiu libro estas noto, ke ĝi estas esperantlingva. Tial la aŭtomataj serĉiloj per serĉvorto "Esperanto" ne trovas ĉiujn esperantlingvajn librojn, kiuj estas en la biblioteko. Kelkaj libroj eniras la elektronikan katalogon nur tiam, kiam iu pruntas ilin kaj la bibliotekistoj notas la librojn en sia komputilo. Ekzemple ni scias, ke jam antaŭ dudek jaroj estis en Moravia Landa Biblioteko Brno trovitaj 170 libroj, tamen nun la aŭtomato trovis nur 30. Tamen la rezultoj, kion la bibliotekoj proponas per interreto, povas esti interesaj (parenteze la nombro de titoloj):

Biblioteko de Akademio de Sciencoj (8)
Nacia Biblioteko de Ĉeĥa Respubliko (13)
Biblioteko Jiří Mahen en Brno (45)
Moravia Landa Biblioteko Brno (30)
Biblioteko en České Budějovice (14)
Havlíčkův Brod (13)
Urba Biblioteko en Jihlava (2)
Mezbohemia Scienca Biblioteko Kladno (29)
Regiona Scienca Biblioteko de Liberec (22)
Scienca Biblioteko Olomouc (63)
Regiona Biblioteko Pardubice (18)
Urba Biblioteko Pelhřimov (8)
Studa kaj Scienca Biblioteko de Regiono Plzeň (9)
Urba Biblioteko Praha ( 95)
Urba Biblioteko Třebíč (11)
Urba Biblioteko en Ústí nad Labem (2)
Regiona Biblioteko František Bartoš en Zlín (12)



## Internacia Esperanto-Konferenco de OSIEK 2004
## Pécs (Hungario), 17-23.7.2004

La dumiljara *Pécs* estas unu el la plej belaj kaj gravaj urboj en Hungario, konata ankaŭ kiel urbo de kulturo kaj arto, pro siaj muzeoj, arta vivo, festivaloj, universitato (1367), monumentoj el la romia kaj la turka epokoj (*monda heredaĵo, sub la protekto de UNESCO*).

**Temo: "Esperanta gazetaro"**

Okazos la *prelegoj kaj diskutoj* dum la antaŭtagmezoj de lundo ĝis ĵaŭdo. Dum krizas aŭ ŝanĝas la formon Esperanta informado, ĉion eblos pridiskuti en la lando de *Eventoj, Ret-Info, Juna Amiko, Internacia Pedagogia Revuo, Naturista vivo, Debrecena bulteno, Literatura Mondo, Budapeŝta Informilo*... Tute najbare al Hungario aliajn gravajn gazetojn redaktis aŭ redaktas *Herbert Mayer, Spomenka Štimec, Stano Marček*...

*Aliaj programeroj:* voĉdonado por OSIEK-premio, prelegoj pri la urbo kaj la regiono, vizito al priesperanta kaj aliaj muzeoj, distro, kulturo, turismo... enurbe, arbare, banloke.

**Postkonferencaj ekskursoj:** aldona tritaga restado gvidos vin pli leĝere tra la milda regiono kaj ĝiaj montetoj, kasteloj, termalbanejoj, vinkeloj, malnovaj protestantaj preĝejoj, naturparkoj ... kun la ebleco viziti la najbaran ĝemel-urbon de Pécs – *Osijek* en Kroatio!

Kontakto: **ORBIS PICTUS de Visnja Brankovic** - Via Parini 5 IT-34129 Trieste, Italio tel/fax: + 39 040 767 875 orbispictus@iol.it (eventuale: visnja.brankovic@os.htnet.hr)

## Kolektado de eltondaĵoj

Per kolektado de eltondaĵoj el ĉeĥa gazetaro pri esperantistaj temoj estis komisiita Jarmila Čejková, Malý Koloredov 1538, 738 01 Frýdek-Místek.

## Katalogo de gravaj esperantistoj

Prof. Vlastimil Novobilský (Školní 5, 400 00 Ústí n.L.) fondis katalogon de gravaj ĉeĥaj esperantistoj. Li kolektas biografiojn (medalionojn) kaj bibliografiojn (verkaron) de aktivaj personoj, kiuj per sia laboro enskribiĝis en la historion de nia movado. Sendu informojn pri merituloj el via klubo.

## Radikala Partio agas

La Radikala Partio (Italio) en decembro 2003 interkonsentiĝis kun la itala ministrino pri instruado, ke ili iniciatos eksperimentan instruadon de Esperanto en la 25 landoj de Eŭropa Unio.

## 81-a Germana E-Kongreso

28.-31.5.2004

okazos en la nord-orienta lando Meklenburgio-Antaŭpomerio, proksime de la pola-germana landlimo. Temo: "Pomerio - ponto inter germanoj kaj poloj".

www.esperanto-nb.de

www.aliaflanko.de

*Brunilde Pfennig*

## "Esperanto en la bibliotekojn"

La kampanjo ekde antaŭ nelonge havas propran komisiiton ĉe Universala Esperanto-Asocio, UEA. En la kampanjo partoprenas kelkaj Esperanto-asocioj, kiuj pretas donaci librojn al diversaj bibliotekoj en la mondo. Se vi interesiĝas pri la projekto, bonvolu kontakti la novan komisiiton!

*Aloisio Sartorato*

*ludoviko44@yahoo.com.br*

## 20.000 vizitoj al Libera Folio

La 5-an de februaro 2004 je 19:19 laŭ la mezeŭropa tempo okazis la 20.000-a vizito en la enirpaĝo de la retgazeto Libera Folio. La dudekmila vizitanto venis el Grenoble, Francio. Dankon pro la vizito!

Libera Folio estis lanĉita la 12-an de aprilo 2003, kaj en tiu tago okazis la ĝis nun rekorda kvanto de vizitoj dum unu tago, 231. La 3-an de februaro 2004 Libera Folio laŭ nia statistikilo havis 130 vizitojn, kaj la 4-an de februaro 110 vizitojn, tamen la efektiva kvanto de vizitoj ŝajne estas pli granda. Vizitu ankaŭ vi ĉe: `http://folio.hrs.net`

## Alternativa Komunikado inter Eŭropaj Lernejoj, AKEL!

En la lernojaro 2003-2004 komenciĝis en kvar eŭropaj mezlernejoj alternativa projekto por instrui E-on al lernejanoj, interŝanĝi la spertojn kaj kontaktigi la komencontojn. Ili jam ekis kontakton kun lernejoj en Portugalio, Hispanio, Pollando kaj Hungario. Ni atendas kontaktojn el nunaj aŭ estontaj eŭropuniaj landoj por eniri la projekton.

*Luis Ladeira*

*Rete: luisladeira@netcabo.pt*

## Kondolencoj

- La 2-an de februaro 2004 forpasis merita esperantisto **Jozef Pawel Bielinski** en aĝo de 83 jaroj, Honora Membro de Pola Esperanto-Asocio, honorigita pro meritoj por urbo Bydgoszcz kaj por kulturo, aŭtoro de kelkaj Esperanto-lernolibroj kaj Esperanto-instrumaterialoj, dum longaj tempoj prezidanto de filio de de Pola Esperanto-Asocio en Bydgoszcz.
- Kun granda bedaŭro mi sciigas vin pri la forpaso de **Josef Murĵan**, unu el la plej aktivaj esperantistoj en Israelo dum la lastaj 40 jaroj.
- La 2-an de februaro 2004 forpasis elstara estona esperantisto, aŭtoro de pluraj lernolibroj kaj vortaroj, honora membro de UEA, **Jaan Ojalo** (1914-2004).

## MES havas propran sidejon!

Mongola Esperanto-Societo, MES ekhavas sian propran oficejon en Mongola Kolegio Tsog pri fremdaj lingvoj, kulturoj kaj turismo. Oni permesis al la societo por subteni kaj helpi agadon de MES senpage posedi unu ĉambron kaj enkonduki nedevigan Esperanto-kurson en la Kolegio.

Pasintsemajne estraranoj de la societo faris lekciojn pri Esperanto, nuntempa monda lingva problemo kaj Esperanto-movado, en kiuj partoprenis ĉirkaŭ 100 gestudentoj de la Kolegio.

Ĉiuj gratulmesaĝoj estas bonvenaj ĉe la estro de la kolegio, G. Davaasuren, rete: tsog@mboh.mn

## Nova TEJO-volontulo!

TEJO ekhavis novan plentempan volontulon en la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio kaj TEJO en Roterdamo (Nederlando). Lia nomo estas Joel Amis kaj li venas el Usono. Vi eble jam konas lian nomon kaj vizaĝon de la paĝoj de Kontakto (ĉar li estas ties vicredaktoro). Ni kore bonvenigas lin kaj tre dankas al la antaŭa volontulo Chuck Smith pro lia bonega laboro dum 2003!

## Studu turismon, kulturon kaj lingvon!

Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo estas trijara nepublika postmaturec-ekzamena lernejo funkcianta ekde 1991, laŭleĝe registrita ĉe Kuratorio pri Edukado en Bydgoszcz (n-ro 232/94) kaj ĉe la Urbestro de Bydgoszcz (n-ro 51/99). En 1996 la studumo akiris la statuson de klerigejo de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino. En la studumo instruadas lekciistoj de AIS, Internacia Esperanto-Instituto (IEI) en Hago, Akademio de Bydgoszcz, Kujavia-Pomerelia Centro por Edukado de Instruistoj, Vojevodia Kulturcentro en Bydgoszcz, krom tio ĵurnalistoj kaj spertuloj de Pola Turisma-Landkona Societo, Societo de Amikoj de la Urbo Bydgoszcz, Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo "Kujavio kaj Pomerelio", Pola Esperanto-Asocio kaj "Flugo".

En la studumo povas studi ĉiu persono, kiu finis 18-an vivjaron, havas bonan sanstaton kaj almenaŭ meznivelan edukitecon (maturec-ekzamenon). Plena eduk-ciklo daŭras tri jarojn kaj permesas akiri sciojn necesajn por labori en naŭ profesioj (simboloj de Eŭropa Unio): **post la 1-a studjaro**: lektoro de Esperanto por komencantoj kaj gvidanto de porinfanaj aranĝoj; (oficisto pri turisma informado, oficisto en vojaĝagentejo kaj internacia vojaĝgvidanto): **post la 2-a studjaro:** lektoro de mez-nivelaj kursoj de Esperanto kaj verkanto de arta ceramiko (organizanto de turisma priservado, regiona turisma ĉiĉerono kaj animanto de kultura agado); **post la 3-a studjaro**: kursgvidanto de Esperanto, specialisto pri organizado kaj disvolvo de turismo kaj specialisto pri organizado de kulturo; ev. titolo de bakalaŭro de AIS pri humanistiko aŭ morfosciencoj.

Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo, str. M.Sklodowskiej-Curie 10, PL 85-094 Bydgoszcz, Polio,
tel. (48-52) 346-11-51
Rete: stud@esperanto-turismo.com

**KONCIZE**

* Kiel nova **Ĝenerala Direktoro de UEA** estis nomumita Osmo Buller, kiu plenumis tiun funkcion jam antaŭ Trevor Steele (ni memoras lin el UK '96 en Prago).

* **Novjaraj statistikoj de UEA**
Ĝis la 9-a de januaro al UK en Pekino jam aliĝis 549 personoj el 44 landoj de la mondo. En 2003 en UEA membris 5627 personoj, kio estas je 0,9% malpli ol en la antaŭa jaro. Trevor Steele, la Ĝenerala Direktoro de UEA komentas la tendencojn tiel: "Plej malbona estas la falo de junaj membroj (MJT kaj MAT) kaj de membroj kun Gvidlibro (ofte unuafojaj). Sed tiu fina rezulto, falo de eĉ ne unu plena procentaĵo, estas relative esperiga. La plej granda ŝanĝo estis salto en la nombro da membroj kun Jarlibro."

* **Diplomiĝu pri Esperanto en Hungario.** En la plej granda hungara ŝtata universitato ELTE ekzistas jam ekde 1966 esperanto-instruado. En la Esperanto-fako finis siajn studojn entute 130 personoj, el inter ili 30 estis eksterlandanoj. Oni povas aliĝi al Esperanto altlerneja fako ankaŭ en 2004. Oni devas elekti el inter la fakparoj: angla-esperanto, arthistorio-esperanto, esperanto-filozofio, esperanto-franca, esperanto-germana, esperanto-hispana, esperanto-historio, esperanto-hungara, esperanto-itala, esperanto-rusa, esperanto-portugala. Por pliaj informoj la interesiĝantoj povas kontakti: Ivan Bujdoso, rete: bujdosoek@hotmail.com

**Telefonu senpage per la reto!**
Ekzistas nuntempe bonkvalitaj iloj por telefoni per la Interreto. Inter la novaj, ekzistas nun Skype (Skajp') ĉe www.skype.com, kies sonkvalito estas tre bona, kelkfoje eĉ pli ol normala telefono. Vi bezonas PC-on kun Vindozo (prefereble XP) kaj mikrofonon. Ĝi funkcias per ĉiaj tipoj de retkonektoj, eĉ modemo 56 Kbps. Emilio Cid verkis esperantlingvan ttt-paĝon por helpi al elŝuto kaj konfigurado de la ilo: `http://www.esperantointernacia.hpg.ig.com.br/skype.htm`.

**Komerc-Industria Ĉambro prezentiĝas en E-o.** La retejo de la Komerc-Industria Ĉambro de Ĉuvaŝa Respubliko (Centra Rusio) ekde nun havas ankaŭ E-lingvan version, apud la rusa, angla kaj itala: www.tppchuvashia.ru/eo .

**Granda konferenco de Radikala Partio** okazis decembre en Bruselo. Inter 500 konferencanoj estis 40 esperantistoj, la prelegoj estis simultane tradukataj al ĉiuj laborlingvoj, do ankaŭ al Esperanto. En la programo aperis ankaŭ punktoj *Instruado de Esperanto* kaj *Federala Lingvo.*

**DAFYDD AP FERGUS**, kimra ĵurnalisto laboranta en Bruselo, estas proklamita kiel la Esperantisto de la Jaro 2003. La internacia ĵurio elektis lin pro lia tre aktiva informa laboro en la Brusela Komunikad-Centro.

**Hodler-biblioteko en Roterdamo** estos ĉijare rearanĝata por kolekti ĉiujn librojn en unu ĉambro (nun ili estas en pluraj).

**Esperanto-muzeo en Vieno** antaŭ 75 jaroj fariĝis parto de Aŭstra Nacia Biblioteko. Okaze de tiu jubileo la muzeo okazigos simpozion (8.-9.10.2004) Esperanto en la uragano de ideologioj, kiu samtempe omaĝos la naskiĝon de Lidia Zamenhof (1904-1942). Samtempe estos preparita ekspozicio en la muzeo pri la sama temo.

## Přerov

La klubo renkontiĝas ĉiun duan semajnon je la 17-a horo, placo Žerotín 20, krom ferioj (16.6.-6.10.).

### Rememore pri Drahoš Kočvara

**Programo:**

Malfermo - prezidanto
Referato - prezidanto
Leciono - prezidanto
Diskuto - prezidanto
Societa ludo - prezidanto
Kultura enmetaĵo - prezidanto
Aplaŭdo - prezidanto




## Havířov

Elektita komitato: Zdeněk Heiser (prez.), Jan Matyáš, Jana Třetinová, Miloslav Pastrňák, Pavla Bradová, kontrolo: Kateřina Hosová. Kunvenoj unufoje en monato por konversaci jak unufoje kun kultura programo (februaro-decembro): Vojaĝado en Portugalio, Meksikio I, Meksikio II, Meksikio III, Esperanta tendarfajro, Egiptujo I, Egiptujo II, Egiptujo III, Zamenhofa vespero.

## Brno

La kunvenoj de EK Brno merkrede je la 18-a en Starobrněnská 15, ĉiun trian merkredon en Kohoutovice (Societo por la internacia lingvo Esperanto).

## Pardubice




Nova kalendaro por 2004 de EK Pardubice kaj AEH.

## Ústí nad Labem

EK kunvenadas nuntempe ĉiumonate la lastan ĵaŭdon je la 15-a horo en la Urba muzeo en Ústí nad Labem. – Kontakto adreso: Klub esperantistů Jiřího Kořínka, Kojetická-str. 90, 400 03 Ústí nad Labem Tel.: +420 475 532 417 aŭ +420 721 851 502, I-rete: m.smycka@seznam.cz; j_kriz @volny.cz; 510815@centrum.cz

## Ostrava-Poruba

Dum 2003 okazis 40 kunvenoj (meznombre 9 partoprenantoj), unu gasto el Brazilo. 10 abonataj gazetoj, aĉetitaj 9 novaj libroj. Unu membro estis en Rimini, ceteraj partoprenis 29 enlandajn aranĝojn.

## P.F. 2004

Ankoraŭ multajn sunelirojn
al kunterloĝantoj

Ĉe mi jam dominas nokto

Mi tamen ne rezignas

Eĉ blinda formiko
batalas kontraŭ herbotigoj

Ĉion bonan al vi
Universanoj

*Čestmír Vidman*

## P.F. 2004

Ještě mnoho východů slunce
spolupozemšťanům

U mě už převažuje noc

Ale nevzdám to

I slepý mravenec
bojuje se stébly trávy

Držím Vám palce
Vesmířané

*Čestmír Vidman*

## NEPROFITEMA AMO

Mi estas ukrainiano. Iufoje mi sidis ĉe la tablo en mia hejmo kaj ion skribis. Estis enŝaltita la radio-ricevilo. Mallaŭte sonis agrabla muziko, poste komenciĝis iu radio-elsendo. Subite mi ekaŭdis la vortojn, kiuj igis min pensi. Trasonis nekutimaj vortoj. En la ukraina lingvo estis dirite: "Genuflekse adorkliniĝu ne antaŭ tiu, de kiu dependas via sorto: ne antaŭ la estro, ne antaŭ la stelo, ne antaŭ la eterneco, sed adorkliniĝu antaŭ la homo bonkor-bonkora, ekzemple antaŭ panjo via!.. Kaj tio estos la alteco, sed ne sinmalaltigo!"

Aŭdante la kortuŝajn vortojn mi ĉesigis la laboron kaj enpensiĝis. Estas ja pri kio pensi, kiam oni instruas nin pri la vera, neprofitema amo… Tiam mi rememoris pri la kompatema junulo, kies koro sentis doloron pro la malfeliĉoj kaj suferoj de la homoj. Mi pensis pri la juna Ludoviko Zamenhof. Mi opinias, ke ni ĉiuj rajtas kaj devas adorkliniĝi antaŭ la bonkor-bonkorega homo, kiu ne povis esti indiferenta al la interesoj kaj bezonoj de la tuta homaro kaj kiu en sia koro, sendube, havis la sinceran neprofiteman amon al la homoj.

En niaj koroj ni ĉiam havu la grandegan dankemon al la aŭtoro de la lingvo Esperanto! Ja li donacis al ni la bonegan rimedon de interkompreniĝo!

*Grigorij Berezin*

# Memoralo Jíra + Hillebrand

21.-25. 4. 2004

**Printempa Naturamika Renkontiĝo Kytlice**

(apud Nový Bor kaj Česká Kamenice)

Aliĝiloj ĝis fino de marto. Anoncu, kiujn manĝojn kaj tranoktojn vi mendas., Pensio por unu tago estas 350 Kč.

**Miroslav Smyčka, Kojetická 90, 400 03 Ústí nad Labem**

## "EUropo por akordo, Esperanto por dialogo"

http://www.e-d-e.org/Leo/index.php

Por elekto de la eŭropaj deputitoj voĉdonu por la listoj Eŭropo Demokratio Esperanto. Por demokratio efika en Eŭropo. Por la subteno de la lingva kaj kultura diverseco. Por Eŭropo sendependa de la influo de USONO, ĝia lingvo kaj ĝia kulturo. Por Eŭropo pli energia por serĉado, monda komerco, diplomata influo. Por Eŭropo, kiu kontrolu ĝian teknokration Por la uzado de la internacia lingvo Esperanto, simpla, efika, kiu donas esprimeblon al ĉiuj civitanoj en internacia debato. Por ke Eŭropo iĝu ekzemplo por solidareco inter popoloj

Por ke Eŭropo iĝu ekzemplo por kunligo de kultura heredaĵo kaj moderneco

# KAEST 2004

## Konferenco

Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko

2004-11-12/14

**Pritraktotaj temoj:**

Sekcio A:

**FAKE PRI ESPERANTO**

Sekcio B:

**ESPERANTE PRI SCIENCOJ**

**Kontaktadreso por peti aliĝilon:**

KAVA-PECH, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201, fakso 257 712 126, rete: info@kava-pech.cz.

www.kava-pech.cz

Aŭtoroj de la kontribuaĵoj estas petataj sendi aliĝilon kun resumo de sia prelego, se eble plej frue, sed plej malfrue ĝis 2004-08-15. Ni petas **ne prezenti** diversajn proponojn de la **ortografiaj aŭ gramatikaj reformoj** de Esperanto.

La konferenco okazos en pensiono Sokol en Dobřichovice (kie jam okazis la antaŭa). Post la konferenco estos eldonita bonkvalita preleg-kolekto kun resumoj en pluraj lingvoj. La antaŭaj prelegaroj (1998, 2000, 2002) ankoraŭ haveblas.













# Novaj libroj

*Jana Melichárková: **Esperanto pro děti**, ilustris Mirka Tomečková, KAVA-PECH 2003, 74 p., 98 Kč, 14x20 cm, oranĝa koloro.*

La lernolibro de Esperanto por ĉeĥaj infanoj (6-12-jaraj) en 30 lecionoj, riĉe ilustrita. La infanoj povas mem kolorigi la bildojn, la lastajn 12 eĉ tondi kaj uzi por ekzercado de la vortoj. En la libro estas ankaŭ ludoj kaj poemetoj. Ne mankas metodikaj konsiloj por instruantoj.

La dua volumo estas preparata.

*Detlev Blanke: **Interlingvistika. Cesty k odborné literatuře.** (Interlingvistiko. Vojoj al la fakliteraturo). Trad. Miroslav Malovec, KAVA-PECH 2004, 70 p., 118 Kč, 14 x 20 cm, verda koloro,*

La ĉeĥa traduko celas ĉeĥajn lingvistojn, por veki ilian intereson pri la internacilingva ideo per supervido pri la ekzistanta interlingvistika literaturo, precipe la esperantologia (sed oni ne uzis la vorton en la titolo por ne provoki antaŭjuĝojn). La broŝuro informas pri interlingvistikaj publikaĵoj kaj periodaĵoj, pri monografioj kaj bibliografioj, pri interlingvistikaj mencioj en gravaj lingvosciencaj periodaĵoj, pri gravaj bibliotekoj kaj arkivoj de interlingvistika literaturo kaj pri la fontoj troveblaj en interreto. Aldonita ĉapitro pri la situacio en ĈR el la plumo de M. Malovec

*Sabine Fiedler; Pavel Rak: **Ilustrita frazeologio**. KAVA-PECH 2004, 140 p., 12 x 20 cm, blua koloro.*

La libro estiĝis surbaze de scienca studaĵo de d-ino Sabine Fiedler, kiu esploris frazeologiajn esprimojn en Esperanto kaj en diversaj lingvoj. Car la scienca stilo estas malfacile digestebla por ordinaraj legantoj, la eldonejo KAVA-PECH proponis al la aŭtorino ellabori varianton por la vasta publiko kun trafaj desegnaĵoj de Pavel Rak.

La libro prezentas 62 frazeologiajn esprimojn, klarigitajn per difino kaj ilustritajn per ekzemploj de uzo, per desegno kaj per kelkaj alilingvaj ekvivalentoj.

*Jan Werner: Terminologiaj konsideroj. KAVA-PECH 2004, 180 p., 14 x 20 cm, hele kakia koloro*

La libro konsistas el kvin partoj: A. Ĝenerale pri faka apliko de Esperanto kaj pri terminologio; B. Terminologiaj principoj; C Leksikaj observoj kaj instigoj; D. Prilingvaj konsideroj; E. Esperanta terminaro de terminologia fako.

## La 77-a kongreso de SAT okazos la unuan fojon en Slovakio

Ekde la 14-a ĝis la 21-a de aŭgusto 2004 okazos, la **unuan fojon en Slova-kio**, la **77-a kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda** (= SAT) en la ĉefurbo Bratislava. SAT estas internacia progresema laborista organizo, kiu kunigas la larĝan spektron de maldekstraj mondkonceptoj. Eble paradokse, tamen fakte logike estis anoj de SAT persekutataj en la erao de stalinismo kaj la landaj filioj de SAT malpermesitaj en Sovet-Unio kaj en la dependaj landoj, inkluzive Ĉeĥoslovakion. Kompare kun UEA, deklaras sin **SAT ne-neŭtrala organizo**, ĝi ne emas toleri ajnan maljustaĵon kaj subpremon. Tamen, precipe dum la lastaj jaroj, SAT kaj UEA vivas en bonaj amikaj kaj kunlaboraj rilatoj.

SAT havas grandan signifon ankaŭ por la ĝenerala Esperanto-movado, precipe por la evoluo de la lingvo. Ĉi-direkte estu menciitaj Plena Vortaro de Esperanto, Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto kaj la antaŭ nelonge eldonita La Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto – ĉiujn ĉi vortarojn eldonis SAT.

Kiel kutime, la kongreso konsistos el **laboraj kunsidoj** (antaŭtagmeze), okazos pluraj traktadoj de la komitato, de unuopaj sekcioj k.s. Sed same kiel ĉiu ĝisnuna kongreso, ankaŭ tiu en Bratislava ne estos nur labora afero. La partoprenantoj de la kongresoj ĉiam emas konatiĝi, almenaŭ supraĵe, kun la lando, kie ili kunvenas, kun la homoj de la koncerna lando, kun ties zorgoj, malfacilaĵoj, sukcesoj. Tial estas en la programon envicigitaj **kulturaj progra-meroj** kaj precipe **duon- kaj tut-tagaj ekskursoj**. Per la ekskursoj la kongresanoj konatiĝos kun la urbo Bratislava mem, kun la urboj Trenčín, Piešťany, Trnava, Modra kaj Pezinok, kun la kasteloj Červený Kameň kaj Trenčín. Certe tre interesaj estos ankaŭ la vizitoj en la atoma energi-centralo Jaslovské Bohunice kaj ĉe la akvobaraĵo kaj kanalo Gabčíkovo. Fakajn prelegojn faros elstaraj Esperantaj spertuloj – ekz. pri la fakaj terminoj en la menciita nova PIV parolos C. Roux, unu el ĝiaj kompilantoj.

SAT komisiis organizi la kongreson en Bratislava la **kongresan agentejon KAVA-PECH** el Dobřichovice (Ĉeĥio), kiu tion faros en la kunlaboro kun **Esperanto-Societo Bratislava (ESO)**. La ĉeĥa agentejo KAVA-PECH havas plurjarajn spertojn en la organizado de diversaj Esperantaj kongresoj, konferencoj kaj seminarioj (ankaŭ de la SAT-kongreso en Karlovy Vary 1999), la slovakaj gesamideanoj devus esti la ĉefaj ideodonantoj kaj kunlaborantoj, ja ili mem plej bone konas slovakan medion kaj kapablas plej efike prezenti la lokon, popolon, kulturon.

Oni atendas alvenon de la kongresanoj el pluraj eŭropaj landoj kaj ankaŭ el la landoj ekster Eŭropo. Do, estos vere „multkolora“ la partoprenantaro de la kongreso. Ĝis la fino de januaro aliĝis naŭ dekoj da partoprenontoj el 17 ŝtatoj kaj kvar kontinentoj.

Por la partoprenontoj el Ĉeĥio kaj Slovakio validas aparte favoraj aliĝkotizoj (ĝis la 31-a de marto 2004!). Pli da detaloj troveblas sur www.esperanto.cz aŭ perpoŝte: **KAVA-PECH, Anglická 878, CZ 252 29 Dobřichovice**.

Zdeněk Pluhař
sekretario de OKK

# La vojoj de kuraĝo en Someraj Esperanto-Tendaroj en Lančov

En sepdekaj jaroj ni preparis la vojon de kuraĝo sur la vojo de la tendara puto ĝis la ŝtonminejo. La konkuro komenciĝis ĉirkaŭ la noktomezo: ĉe la puto startis unuopaj konkurantoj. Sen lumilo oni tute povas vidi nenion. Sed sur la vojo de la tendaro mi aŭdis paŝojn. Kiam la persono estis tute ĉe mi, mi vidis la policestron sinjoron Matouš, kiu mem observis la tendarojn kaj nun malrapide iris hejmen al Lanĉov. Mi sukcesis nur diri: "Sinjoro kapitano, per tiu ĉi vojo vi ne iru, hodiaŭ ĉi tie fantomas." La kapitano respondis: "Paŭlo, mi estas tiel dormema, ke ĉiuj fantomoj de la mondo estas al mi tute egalaj." Kaj spiregante li malrapide foriris. Mi tuj startigis la lastan konkuranton kaj rapide iris por haltigi la policestron.Sed vane. Mi estis jam nur kelkajn paŝojn malantaŭ li kaj mi aŭdis terurajn insultojn. Mi lumigis lumilon, ankaŭ samideano Jaris kaj ceteraj kaj vidis s-ron policestron kuŝantan sur la vojo. Tra la vojo estis streĉita ŝnuro, li piedpuŝetis kaj dum la falo saltis per la manoj al preparita lavujo, kiu estis plena de akvo. Post kelkaj sekundoj li diris: "Tiu ĉi nokto estis por mi iom malpli terura ol tiu lastjara." Iu ekkriis: "Kia estis tiu lastjara, s-ro policestro? Rakontu!"

Ni sidigis la policestron sur iom grandan ŝtonegon: "Pasintjare iam en tiu ĉi tempo, mi nokte jam dolĉe sonĝis. Subite iu frapas al mia pordo.

Mi ellitiĝis kaj en nokta vestaĵo malfermis la pordon. Staris tie mia najbarino kun larĝe malfermitaj okuloj, tute tremanta kaj kriis: "Sur nia tombejo estas fantomoj, la kadavroj reviviĝis." -

"Ne babilu, najbarino, mi tuj ĉion esploros."

Mi vestis min kaj iris. Jam de lastaj vilaĝdometoj mi vidis personon, kiu eniris la tombejon kun kandelo. Mi rememoris, kion diris al mi antaŭ kelkaj tagoj la esperantisto Paŭlo pri la nokta ludo! Enirinte la tombejon mi vidis dekojn da kandeloj sub la ĉefa kruco. Mi kaŝis min malantaŭ arbo. Ĵus venis junulo ankaŭ kun kandelo, ĉirkaŭiris la ĉefan krucon kaj en la angulo de tombejo eniris la kadavrejon. Tra mia dorso iris frostotremo. Post kelkaj momentoj li revenis, metis la kandelon sub la krucon kaj rapide foriris de la tombejo.

Mi kaŝe post li. Ĉe la vojo apud la arbaro multe da gejunuloj kuŝas sur la tero kaj eĉ ne spiras. Inter ili ĉi tie via Paŭlo! Kaj nun mi ekaŭdis, kion mi ne vidis. En la kadavrejo sur portilo kuŝas viva kadavro, kiu havas sur la brusto ĉokoladojn. Ĉiu devis forpreni ĉokoladon kiel pruvon, ke li eniris la kadavrejon."

La policestro Matouš finis sian rakonton kaj kune kun la tendara patrolo, kiu havis lumilojn, foriris hejmen por dormi kaj sonĝi.

**Aldono**. *Jam kelkajn jarojn mi almenaŭ unufoje dum la etapoj vizitas la tombejon en Lančov por rememori bonajn homojn, kiuj dum 45 jaroj de ekzisto de nia SET en la golfo de Lančov estis niaj amikoj aŭ helpis al ni. Apartenas al ili ankaŭ la policestro Matouš. La brulanta kandelo sur lia tombo estas por li.*

# Geraldo Mattos

En la gazeto de Brazila Esperantisto n-ro 322 de januaro-marto 2003 mi legis artikolon kaj intervjuon kun prof. Geraldo Mattos, prezidanto de nia Akademio.

Mi fariĝis esperantistino en 1948. Studento Geraldo Mattos estis unu el miaj tiamaj korespondantoj. Liaj leteroj, en kiuj li perfekte klarigis al mi la E-gramatikon, liaj bildkartoj kaj ceteraj materialoj multe helpis min agi por Esperanto inter miaj trupaninoj de skoltina grupo. Post likvido de skoltismo en 1950, kiam ni transiris al la organizo de Esperanto-Junularo en Třebíč, kie mi instruis al du grupoj nian lingvon, denove helpis min la leteroj de Geraldo. Mi fiere montras al vi la poemon, kiun Geraldo sub sia pseŭdonimo Aldo Ger sendis kaj dediĉis al mi.

Olga

En preskaŭ ĉiu lando de la mondo,
Ni vidas aron da samideanoj,
Da homoj, kiuj kun plektitaj manoj
Vivadas en la Esperanta rondo.

Ni penas kun la forto de titanoj,
Per libroj, revuetoj, korespondo,
Konstrui digon kontraŭ ĉiu ondo
De lukto starigita de satanoj.

Ni ĉiuj amas nian idiomon,
Car parolante aŭ skribante ĝin,
Ni ĉie trovas hejmovarman domon.
Pro tio, Olga, ĉar mi konas vin
Per ĝi, se mi prononcas vian nomon,
Mi ja parolas nomon de fratin'.

Via Geraldo

Geraldo sendis al mi Esperantistan Memorlibreton kaj enskribis la duan poemon:

Olga,
Dolĉa mia karulino,
Ne forgesu la poeton
En la sorĉan vian reton
Implikitan de destino!

Submetita de inklino,
Li murmuras unu peton:
Dolĉa mia karulino,
Ne forgesu la poeton!

Jen akceptu sen obstino
Tiun ĉi memorlibreton;
Tamen gardu ĉi sekreton:
Memortenu min sen fino,
Dolĉa mia karulino!

*28.8.53 Geraldo*

En 1952 mi kiel la unua virino kun amikoj komencis organizi la 1-an Someran Esperanto-Tendaron, tiam en la golfo de Chvalatice ĉe akvobaro Vranov. Unu el organizantoj estis la ĉefo de E-Junularo en Třebíč, poste mia edzo Pavel Sittauer. Naskiĝis al ni la filino Olga. Kiam ŝi 13-jariĝis, ŝi jam en la SETo instruis Esperanton. Longajn jarojn ŝi ne nur instruas, sed ankaŭ helpas al ni organizi la SET-on kaj en etapoj funkcias kiel ĉefinstruistino aŭ gvidantino. Sia filino Lenka instruas en la SET aŭ la anglan, aŭ la hispanan lingvojn. Kaj ambaŭ genepoj estas membroj de UEA.

*Olga Sittauerová*

**La revuo *Esperanto* daŭrigas la kampanjon**

# MEMBRO-MEMBRON

*Se ĉiu el ni akirus nur unu novan membron, UEA, do ankaŭ la legantaro de la revuo, duobliĝus. Multaj esperantistoj membriĝus en UEA, se iu proponus tion al ili!*

**La kampanjo MEMBRO-MEMBRON estas konkurso kaj daŭros ĝis la fino de junio 2004.**

Ĉiu membro de UEA, kiu akirus novan individuan membron (en ajna kategorio), ricevos libropremion.

Unu konkursanto (decidos loto) ricevos ***La Novan Plenan Ilustritan Vortaron de Esperanto***. Ekzempleron de *La Nova PIV* ricevos ankaŭ membro, kiu akiros plej multajn novajn membrojn. La lotumado okazos dum la 89-a UK en Pekino.

**La kondiĉoj:** bonvolu informi la redaktoron de *Esperanto,* ke vi akiris novan membron: **via nomo, via UEA-kodo, la nomo kaj adreso de la (de vi akirita) nova membro.**

**Redakcio de la revuo *ESPERANTO,***
**Stano Marček, Zvolenska 15,**
**SK - 036 01 Martin,**
**SLOVAKIO - SLOVENSKO**

**Helpu ankaŭ vi vastigi nian komunumon!**

## Nova branĉo de la Agado "Lingvo de Paco"

Kelkaj esperantistoj de la landoj de centra Afriko, rekte envolvitaj en lastatempaj sangaj militoj, kunlaboras kun UEA por la kampanjo "lingvo de paco/ ururimi rw'amahoro". Temas pri kampanjo, kiu celas kunligi esperantistojn el la malsamaj militantaj gentoj de Burundio, Ruando kaj Orienta Kongo (la tiel nomata regiono de la grandaj lagoj), kiuj instruas Esperanton al siaj samgentanoj por organizi post unu aŭ du jaroj grandan intertriban, interetnan, kaj interlandan renkontiĝon de esperantistoj en Buĵumburo, Burundio.

La surloka gvidanto de la agado, Birindwa Mushosi el Buĵumburo, skribas: „Esperanto estas taŭga lingvo por batali kontraŭ etnaj kaj tribaj problemoj. Ekzemplo konkreta estas la etoso en niaj ĉi tieaj kluboj, kiuj grupigas geamikojn el malsamaj etnoj, sed danke al Esperanto oni neniam aludas al tiu aŭ tiu etno. Ni bonetose kunlaboras kaj kunloĝas. Se ĉiuj havus la ŝancon lerni Esperanton.....".

Verŝajne temas ne tiom pri la lingvo mem, kompreneble, kiom pri la valoroj, kiuj kuniras kun Esperanto.

Se vi volas subteni ĉi tiun agadon, en ĉi tiu momento ĉefe per lernomaterialo sendota al tiuj landoj, bonvolu utiligi la kutimajn pago-eblecojn al UEA. Indiku, ke la pago estas por Fondaĵo Espero/ lingvo de paco.

Renato Corsetti
renato.corsetti@esperanto.org

## PLASY

E. K. Plzeň invitas vin al **3-a Turista Renkontiĝo Esperantista en Plasy** (TREP), kiu okazos denove en belega naturo (25 km norde de Plzeň en ripozloko Máj) en tagoj **17.-20.6.2004**.

Vi povos ekkoni novajn interesaĵojn en la regiono dum ekskursoj aŭ piedpromenoj kaj vespere dum videoprojekcio.

La prezo de restado inkluzive de loĝo en kelklitaj ĉambroj kaj manĝo 3-foje dum tago estas nur 270 Kč (10 eŭroj) por 1 tago.

Pliajn informojn al vi disdonos kaj aliĝilojn kun adreso kaj naskiĝdato akceptas: Václav Kaprál, 331 51 Kaznějov 252, ĝis fino de majo 2004. Ĉiuj estos bonvenaj.




## NEKVASOVY

**14.8. - 24.8.2004**
(Eblas partopreni nur unu semajnon aŭ malpli longan tempon)

ESPERANTO KLUBO PLZEŇ aranĝos por geesperantistoj, favorantoj de Esperanto, biciklistoj kaj turistoj

**13 -an Refreŝigan E-tendaron** (RET) en pitoreska vilaĝo Nekvasovy, kiu situas sur la fervojtrako Plzeň - České Budějovice. Proksimume 40 km sude de urbo Plzeň.

**Loĝado** en turisma tranoktejo de Sporta Klubo rande de vilaĝo. En la tranoktejo estas kuirejo, manĝejo-klubejo, higiena ekipaĵo kun varma akvo.

**Manĝaĵo** estas trifoje dum tago.

**Programo:** ekskursoj en ĉirkaŭaĵo - piede, trajne, aŭte. Ankaŭ por biciklistoj estas ĉirkaŭaĵo tre taŭga.

Lingvaj kursoj, konversaciaj rondetoj, sportaj kaj amuzaj ludoj, naĝado, komuna gimnastikado, ktp. laŭ via deziro.

**Prezo:** 1650 Kč ( Prezo por unu tago 170 Kč )

**Kapacito:** 15 - 20 personoj

**Adreso:** Stanislav Pech, Zdemyslice 108, 336 01 Blovice ( 737 330 063 ) esperantoplzen@centrum.cz

# PRIVATA MALFERMA DANKLETERO

al la Esperanto-klubo en ÚSTÍ nad LABEM

Karaj gesamideanoj,
revenante en mia memoro al la plej profundaj travivaĵoj de la ĵuspasinta jaro, min frapis mia kulpo: ke mi ne dankis vin pro la 16-a KULTURA FESTIVALO. Mian kulpon ne malgrandigas la fakto, ke same la mencio pri la afero troveblas en neniu presorgano. Opiniante, ke neniam estas malfrue danki (kaj laŭdi), estiĝu ĉi tiu letero artikolo por la STARTO kaj por la INFORMILO, sojle de la nova jaro.

Eble ne ĉiujn programerojn mia memoro konserviĝas ĝuste en tiu ĉi momento, sed la plej gravajn certe. Plej gravan ni opiniu la tristan temon pri la holokaŭsta koncentrejo TEREZÍN, kiu pro sia amplekso fariĝis la temo „dutaga". La unuan tagon konatigis nin s-ano Jiří Laube per eminenta maniero kun la afero – pere de memfarita video-filmo, kiun li akompanis per la klarigo, kiun li daŭrigis dum la venonttaga ekskurso „en la realo" do en la urbo Terezín mem.

Ĉiloke ni menciu, ke tiu nomo estas rara nocio; al ĝi apartenas ne nur la Josefa Fortikaĵo, sed ankaŭ la urbo mem, kaj la ĉirkaŭo – ĉio ĉi estis la homon detruinta koncentrejo, kiel estas dokumentita ankaŭ en la Muzeo. Ĉar ĉi letero estas mia, privata, do mi ne opinias maltaŭga la tristan informon, ke en ĝi estis arestita juna Zuzka Podmelová – Karenová, kiun ni multaj konas kiel oferema edzinon de la poeto Jiří Karen.

Fermante miajn okulojn kaj „malfermante miajn orelojn", mi aŭdas la muziklavangon de la akordeono, kiun tiel majstre regis nia gasto (aŭ „gastino?") el Svedujo – Kristina Nestorova (Kris Ness), kara edzino de s-ano Gabriel Nestorov. Li mem disvolvis sian eseon pri la (mal)espero, kiun havas en nuntempa mondo nia ESPERO, kaj ankaŭ li mem prezentis, laŭprofesie, sian edzinon. Menciinda estas la fakto, ke ŝi ĉiujare gajnadas la plej gravajn premiojn dum la akordeon-festivaloj eŭropaj.

Miaopinie ni digne kaj sincere rememoris la neĝisvivitan 90-jariĝon de s-ano Štefo Urban, kiu famiĝis (siaklopode) kiel gitaristo kaj muzik-pedagogo, kaj kiel edzo de la poetino Eli (ŝiaklopode). Estis prezentita eĉ lia literaturaĵo „Atlantis".

Mi perceptis, inter la aŭskultantoj, grandan intereson pro la prelego de inĝ. Jan Werner. Li kortuŝis nin per la parolo, kiel „en la pioniraj tempoj" Esperanto entuziasme disvolviĝis, precipe en la Ostrava-regiono, frunte de la junularo tiama, kaj kiel ĉi tiu impeto estis sufokita per la oficiala reĝimo.

Ni ĉiuj dankeme spertis spritecon de juna s-ano Bohumil Bouzek (kiu ĉeestis – tiu bongustis – „je sano nia, glaseto vina“, mi esperas grandanimecon pro mia „versado“, flanke de la legantoj!)
Se ni aldonos la muzik- kaj kantkoncertojn, kiuj okazis ĉu sur la podio teatra, ĉu en la „Ruĝa preĝejo“, ni povas alte taksi, sed apenaŭ imagi, kiun grandiozan laboron faris la samideanoj en Ústí, frunte de s-ano Smyčka, prezidanto de la klubo kaj belkantisto samtempe, en unu persona korpo. Esperante ke ankaŭ aliaj partoprenantoj estas same dankemaj kiel mi, mi finas mian certe nekompletan, sed des pli „paroleman raporton“ pri la afero per la jam tradicia voko:

VIVU la 17-a KULTURA FESTIVALO en ÚSTÍ nad LABEM.

*Margit Turková*
*en Obořiště, la 8-an de januaro 2004*

## LANČOV 2004

Vole nevole, tedy chca nechca či chtě nechtě – já musím. Musím opět něco napsat k nadcházejícímu **SET Lančov.** Loni jsem na těchto stránkách přišel s nápadem, aby se každý z nás pokusil získat, přesvědčit, poslat alespoň jednoho (nejlépe mladého) člověka nebo člověčici na některou ze tří etap **SET Lančov.** Podařilo se mi vypravit tam 9 účastníků. Bohužel jenom tři se věnovali esperantu. Podstatné však je (odvažuji se domnívat) zvýšení počtu mladých, kteří se s esperantem seznámí i jaksi bokem, když se učí třeba angličtinu. Ale hlavní je, že se sejde na **Lančově** víc lidí, což je jistě i ekonomický přínos pro tábor a jeho provoz.

Pro letošek mám drobnou obměnu téhož. Je zcela určitě dobré někoho tam poslat. Lepší však bude, řeknete-li někomu: “Jedu na **Lančov,** pojeď se mnou…“ Je mi líto, ale já to udělat nemůžu (můj zdravotní stav mi to nedovolí). Postaru – starého psa novým kouskům nenaučíš – opět několik lidí pošlu. Nejraději bych jel s nimi, ale…

Drahé samideánky a drazí samideáni, prosím vás, pokuste se svojí účastí a účastí svých známých podpořit **SET Lančov.** Bez něj by náš svaz nebyl úplný. Ještě malý dodatek. Dnešní člověk žádá výběr, bohatou nabídku. Tu Lančov dává ve třech čtrnáctidenních etapách, v několika kurzech. Pokud ovšem chce někdo, nebo může v létě věnovat esperantu jenom týden, i ten má možnost. Je zde katolická sekce, která pořádá tábor s menším nárokem na čas.

Věřím, že díky vašemu úsilí se **ve Startu** dočteme koncem roku o plně obsazených táborech. Lančovském i o tom, který pořádá katolická sekce. A na konferenci to společně oslavíme.

*Těším se. Fidel*

Glanville Price kaj kolektivo: **Encyklopedie jazyků Evropy** (*Enciklopedio de lingvoj en Eŭropo*), enĉeĥigis Václav Černý, Sáva Heřman, Zlata Kufnerová, Volvox Globator 2002, 799 Kč - premio de ĵurio en la Praga ekspozicio Libromondo 2003.

---

*Ĉar unu el la tradukintoj de la libro, en kiu ne mankas informoj pri planlingvoj, estas membro de nia asocio, ni petis lin prezenti la verkon.*

---

La kunteksto de eŭropa kultura kaj lingva diverseco instruis ĉeĥojn jam de nememoreblaj tempoj kompreni tiujn kvalitojn ne tiel, kiel kutimis la antikvaj grekoj - kiel simptomon de barbareco, sed kiel naturan situacion de unuopulo kaj de la tuta komunumo, kiun necesas alfronti per profunda sciado. Ni rememoru *Pordegon de Lingvoj* fare de Komenio kaj lian ilustritan enciklopedion *Orbis pictus* (origine lernolibron de la latino) - kun du- aŭ plurlingvaj tradukoj al diversaj eŭropaj lingvoj, kiu ekde la jaro 1658 atingis dekojn da eldonoj en dekoj da lingvoj.

La longdaŭra intereso pri studado de fremdaj lingvoj elvokis ekziston de ampleksa libroserio de Vymazal "facile kaj rapide", kiu propagandis la malnovan sentencon pri riĉigo de unuopulo per sciado de lingvoj.

Praktikaj lingvaj manlibroj priskribas gramatikan strukturon de koncerna lingvo, ĝian vortprovizon kaj uzon. Teoriaj enkondukoj en lingvostudadon koncentriĝas al evoluleĝoj, al parenceco de lingvoj ktp.

La prezentata Enciklopedio de lingvoj en Eŭropo liveras en preskaŭ 250 kapvortoj (socio)lingvistikan - en formo de eseo - priskribon de eble ĉiuj lingvoj (inkluzive de mikrolingvoj) aperintaj en la pasinteco kaj estanteco en Eŭropo, ĉe ĝia periferio kaj ankaŭ servantaj kiel komunikiloj de almigrintaj etnaj komunumoj. Apud la reliefe bildigitaj t.n. eksteraj historioj de la lingvoj ili enhavas kapvortojn kaj ankaŭ informojn pri la planlingvoj (inkluzive de Esperanto) kaj pri la gestlingvoj (kompletigitaj per informoj pri la ĉeĥa gestlingvo).

La libro enhavas ankaŭ mapojn pri disvastigo de unuopaj lingvoj, alfabetojn de la lingvoj, kompletigajn glosojn pri la teksto kaj registron. Oni trovos tie ekz. supervidon de plej gravaj planlingvoj ("artefaritaj") kaj mencion pri la usona eldono de la Zamenhofa libro du jarojn post la eldono varsovia (1889). La ĉeĥa eldono estas kompletigita per klare aranĝita informo pri transskribo kaj elparolo de literoj kaj literkombinoj en kelkaj lingvoj, en kiuj ekzistas diafanaj reguloj por rilato inter la litero kaj sono.

S.H.

## Lingvaj ludoj kaj enigmoj (16)

Solvoj de la ciferkaŝoj el la antaŭa numero:

29. senti, silo, lento, tolo, oni, tenti, oleo, selo, SILENTO
30. vilao, loĝi, volo, vivi, vala, VILAĜO, aĝo

Al la stoko de la kombinaj enigmoj apartenas ankaŭ

SILABUMO

La principo estas: unu vorton dismunti je silaboj kaj el ili formi pluajn vortojn. Unuopajn silabojn oni povas uzi kelkfoje. Ekzemple: KA-RA-VA-NO: kara, rara, rano, varano, vano, nova, kava, kano, rava, vaka ...

En la enigmoj oni signas la silabojn per romaj ciferoj. La divenotaj esprimoj povas esti vicigitaj en kolono kun difinoj. Por rimaĵoj estas uzeblaj nur tiuj, kiuj havas rilaton al la temo de la teksto.

Jen du solvitaj montraĵoj:

| | | |
|---|---|---|
| III-I | modelo | Solvo: tipo |
| II-I | buŝrando | lipo |
| III-IV | nerva muskol-kuntiro | tiko |
| II-IV | tralaso de likvaĵo | liko |
| I | porcia prepozicio | po |
| II | persona pronomo | li |
| I-II-I | marfunde fiksita celenterulo | polipo |
| I-II-III-IV | agado pri ŝtat-aferoj | POLITIKO |

Rememor' pri hejma II-I en la I-III restas,
grava III-II de I-II-III en ĝi certe estas:
floro kun I-III-II ruĝa ĉe la III-I nestis,
sur la korto bunta I-I per la krio manifestis.

Solvo: loko, koro, rolo, KOLORO, korolo, roko, koko

Du taskoj por vi:

31.

| | |
|---|---|
| I | numeralo |
| I-IV | duton-ripeta |
| II-III | poseda pronomo |
| II-IV | haret-plena |
| IV | Esperanta artikolo |
| IV-II | akvopurigi |
| II-II | ekzisti |
| I-II-III-IV | banala |

32.

I-IV ĉe la I-II-III-IV vin kaptas?
Sen ĝia III-IV ja III-III III povos,
IV nur sufiĉas sin II-III el seĝo,
ekster ĝi novajn inspirojn vi trovos.

Josef Cink

## Aforismoj kaj anekdotoj

Lordo Wawerley estas tiel granda snobego, ke li veturas en alia aŭto ol lia ŝoforo.

Amiko al amiko: "Vi eminente kuiras. Ĉu tio estas via hobio?"
"Ne, instinkto de memkonservado."

Gepatroj sendis sian filon al avo por 14 tagoj. Post ĉi tiuj 14 tagoj ili sendis al la avo telegramon: "La nepon ne sendu, ĉi tie furiozas uragano."
La avo respondis: "Mi sendas la nepon, prefere sendu la uraganon."

*-jb-*

# ĈESAT - 2003

La 23-a Ĉeĥa-Saksa Tago okazis en Ústí nad Labem la 7-an de decembro 2003. Antaŭtagmeze okazis prelega matineo, en kiu oni komence rememorigis kaj honorigis la forpasintajn samideanojn, Drahomír Kočvara el Ostrava kaj Joachim Giessner, kiu estis honora prezidanto de la E-klubo en Ústí n.L. (oni subskribis kaj forsendis al la familianoj kondolencleterojn). Sekvis prelegoj pri Bretonio kaj Kaliningrad (Inĝ. Zdeněk Polák), pri situacio en la Slovaka E-movado (Martin Minich) kaj pri la vivoverko de R. Wagner (M. Smyčka kaj Vratislav Balák). Sekvis medalionoj pri Jaroslav Mařík (90 jaroj de la naskiĝo) kaj Jaroslav Novobilský (100 jaroj de la naskiĝo).

Posttagmeze okazis koncerto, en kiu rolis Kateřina Kudlíková (soprano), Miroslav Smyčka (baritono), Jan Duda - violono, Drahoslava Dvořáková (pianakompano) kaj Martin Minich (prezento de versoj de E. Geleta).

La tradician ĈESAT ĉeestis ĉi-jare entute 42 gesamideanoj el 4 landoj (Francio, Slovakio, Germanio kaj Ĉeĥa respubliko - 9 lokoj).

## El letero pri ĈESAT

Interese estis aŭskulti prelegon pri Richard Wagner, mondfama germana komponisto, de kies naskiĝo pasis 190 jaroj kaj de kies morto 120 jaroj. (Onidire) la unuaj muziknotoj de la opero Tannhäuser estis elpensitaj sur la altaĵo de la kastelo Střekov ĉe Ústí n/L. La parolo estis pliriĉigita per la videoprojekciado el kelkaj operoj de R.W.

Kun granda ĝuo ni aŭskultis fluan (kaj flugan) parolon de la slovaka gasto - junulo Martin Minich. Li nin informis pri ŝanĝiĝanta strukturo de l' Esperanto-movado en Slovakio, kiu senĉese serĉas pli efektivan vojon, kaj kie la direktilon prenis en siajn manojn la junularo, kiu estas afero ne nur ĝojiga, sed ankaŭ postsekvinda.

Bedaŭrinde jam ne estis tempospaco por komune kanti la tradiciajn kristnaskajn kantojn; almenaŭ tiuj povis ĝoji, kiuj ricevis donacetojn de "Sankta Nikolao" (pere de tombolo).

Al ĉiuj organizantoj mi esprimas dankon mian kaj ankaŭ de mia (nia) franca gasto Pierre Terrier. Ankaŭ vi, Pierre, pliriĉigis nian internacian etoson...

*Margit Turková*

# Aŭskultu la Esperantajn elsendojn el Pekino

Proksimiĝas la 89-a Universala Kongreso en Pekino. Fine de julio renkontiĝos tie geesperantistoj el la tuta mondo por ĝui la samideanan etoson kaj por konatiĝi kun la naturaj kaj historiaj vidindaĵoj de la bela ĉina lando.

Sed ne ĉiu esperantisto povas vojaĝi al Pekino. Tamen la antaŭkongresajn preparojn kaj la kongreson mem povos mense partopreni eĉ tiu, kiu en Pekinon ne veturos. Tion ebligas al ni la Ĉina Radio Internacia, kiu ĉiutage elsendas unuhoran programon en la Internacia Lingvo. Bonŝance la elsendoj estas sufiĉe kontentige aŭdeblaj ankaŭ en nia lando. Provu do ankaŭ vi kapti la esperantlingvajn programojn el Pekino kaj tiamaniere informiĝi pri la preparoj de la Universala Kongreso.

Ĉiu elsendo enhavas novaĵojn kaj komentariojn sub titolo „Kurantaj aferoj". Poste sekvas aliaj programeroj, kaj nome lunde „Leterkesto" – konversacio kun aŭskultantoj, marde „Vojaĝo en Ĉinio" pri turismaj vidindaĵoj de la kongresa lando, merkrede „Ĉina Kulturo", ĵaŭde „Ekonomia Panoramo", vendrede „Socia Vivo", sabate „Esperanto en Marŝo" – 40-minuta programo kun informoj, intervjuoj kaj raportaĵoj pri la ĉina kaj tut-monda movado, kaj dimanĉe „Mozaika Dimanĉo", ofte kun literaturaj programeroj.

La elsendoj el Pekino estas ĉe ni aŭdeblaj dum la vintra periodo de la 20.30 h ĝis la 21.30 h per frekvencoj 9720 kHz kaj 7265 kHz (t.e. 30,86 m kaj 41,29 m), sed somere, t.e. post la 21-a de marto ili estos aŭdeblaj de la 21.30 h ĝis la 22.30 h verŝajne per frekvencoj 9880 kHz kaj 11810 kHz (t.e. 30,36 m kaj 25,40 m). La elsendoj estas aŭdeblaj ankaŭ rete: http://esperanto.cri.com.cn. Provu aŭskulti la elsendojn, eble vi ne sukcesos tuj, sed se vi estos paciencaj, vi trovos la programojn aŭskultindaj. Kaj poste skribu al la radiostacio, ke vi aŭdis la elsendon. La adreso estas: Ĉina Radio Internacia, CRI-36, Esperanto-redakcio, Poštkesto 4216, Pekino, 100040, Čína. Aŭ uzu la retadreson: espradio@cri.com.cn. Vi povos ricevi senpage koloran informilon „Mikrofone", kiun la Esperanto-redakcio aperigas kvaronjare.

La 19-an de decembro 2004 pasos 40 jaroj ekde la komenco de la Esperanto-elsendoj de Ĉina Radio Internacia. Tiuokaze la redakcio atendas artikolojn (rakontojn, poemojn, eĉ fotojn) de aŭskultantoj sub la titolo „Mi kaj Esperanta elsendo de Ĉina Radio Internacia" ĝis la 15-a de junio 2004. Estos atribuitaj valoraj premioj al aŭtoroj de la plej bonaj artikoloj kaj krome ĉiu partoprenanto ricevos belan memoraĵon.

Aŭskultu do la Esperanto-elsendojn el Pekino kaj skribu tien. kaj bone ĝuu la senperajn raportaĵojn pri la Universala Kongreso inter la 24-a kaj 31-a de julio 2004.

*Jiří Patera*

# Ni kondolencas

- la 25-an de novembro 2003 forpasis fama germana esperantisto **Joachim Giesner**
- la 26-an de novembro 2003 mortis **Jan Toman** el Jaroměř
- La 7-an de decembro forpasis en Vyškov en aĝo de neĝisvivitaj 91 jaroj **Drahomíra Slezáková**. Ŝi estis Istruistino, antaŭ la dua mondmilito ŝi instruis en Slovakio, post la milito ŝi vivis en Vyškov. Ŝi dum multaj jaroj membris en loka E-rondeto, kie ŝi instruis Esperanton, kaj en ĈEA. En pli alta aĝo ŝi jam ĉesis instrui, sed kiam tion ŝia sanstato kaj vetero (precipe vintra) permesis, ŝi regule vizitadis kunvenojn de E-rondeto. Iom post iom malboniĝis ŝia vidkapablo kaj ŝi eĉ ne kapablis legi Starton. Tamen ŝi pagis almenaŭ membrokotizon sen Starto. Pro alta aĝo ŝi longe ne partoprenis iun ajn E-renkontiĝon, do ekster Vyškov ŝi preskaŭ ne estis inter esperantistoj konata. En memoroj de tiuj, kiuj konis ŝin, ŝi restos kiel agrabla kaj modesta samideanino.

*Josef Vojáček*

# Dopis všem členům ČES

Jedním ze způsobů, jak zviditelnit esperantské hnutí, je zvýšit naši aktivitu. Nechci tím říci, že kluby a kroužky jsou málo aktivní, ale s jejich činností nejsou seznámeni další členové. O tom, že se konalo regionální setkání, se dovídáme až z článků ve Startu nebo na celostátní konferenci. To jé dosti málo, ale hlavně pozdě. Proto prosím ty, kteří mají zájem se účastnit regionálních setkání, aby mi zaslali adresu, na kterou mohu elektronickou poštou rozesílat pozvánky. Nemusíte mít přímo sami internet, ale stačí udat adresu svého příbuzného či známého, který bude ochoten vám pozvánku předat. Tímto chci oslovit i ty, kde klub či kroužek již zanikl. Regionální setkání s vysokou účastí na sebe upozorní více veřejnost, současně je to i poděkování místnímu pořadatelskému kroužku. Na setkání můžete s sebou vzít i své děti, vnoučata či přátele. Třeba je esperanto zaujme natolik, že se z nich jednou stanou řádní členové esperantského svazu. Při regionálních setkáních je prezentováno i město, jeho pamětihodnosti, výstavy.

Dostaneme se do povědomí radnic, od kterých je možno žádat o příspěvky na činnost, do místní či regionální televize, jak se nám to podařilo ve Svitavách. Články o setkáních v tisku by se měly stát samozřejmostí. Na konferenci jsem vám nabídla pomoc se žádostí o příspěvek. Odezva je velmi malá. Ráda bych sestavila kalendář oblastních setkání, aby se akce nepřekrývaly. Pokud můžete, stanovte již nyní termín a oznamte mi to. Těším se na další spolupráci, na vaše náměty, jak esperanto zviditelnit.

**Komitatano Ing. Libuše Dvořáková**
Zahradní 2/B, 568 02 Svitavy, 461 532 257, dvorakovalibuse@quick.cz

# KALENDARO 2004

16.-18.4. Adonido Ratíškovice
14.-20.4 Skokovy (AEH)
21.-25.4. Printempa Naturamika Renkonto Kytlice
28.-30.5. Kongreso de Slovaka Esperanto-Federacio en Nové Mesto nad Váhom
17.-20.6. Plasy
14.-31.7. Flugkaravano al UK Pekino
**SET Lančov**
4.-17.7. 1-a etapo
18.-31.7. 2-a etapo
1.-14.8. 3-a etapo
13.-15.8. Renkontiĝo de ekstendaranoj
31.7.-7.8. 54-a kongreso de KELI Bystřice pod Hostýnem
7.8. E-ekspozicio en regiona muzeo Břeclav
7.-14.8. Katolika tendaro Sebranice
14.-21.8. 77-a kongreso de SAT Bratislava
21.-28.8. Turisma renkontiĝo (Prago, Bohemia Karsto) - postkongreso de SAT
14.-24.8. Nekvasovy
24.-29.8. AEH-IKEH Pardubice
28.8. Esperanto-tago Pardubice
1.-3.10. 17-a IKF Ústí nad Labem
aŭtuno: Konferenco de ĈEA
10.-12.11. Terminologia seminario IFEF pri trafiko - Dobřichovice
12.-14.11. KAEST Dobřichovice
11.12. 24-a ĉeĥa-saksa tago Ústí n. L.
decembro: 100 jaroj de J. Vondroušek kaj V. Scheiber

# Jak platit svazu

V kterékoliv pobočce Komerční banky vyplníte pokladní složenku pečlivě ve všech kolonkách, tedy: *měna účtu*: Kč, *č. účtu*: 3330 021/0100, *měna hotovosti*: Kč, *částka*: kolik platíte, *jméno a příjmení*, adresa, RČ (nemusí být). Pokud platíte za kroužek (klub, sekci), vyplňte stručně (EK Velim) do kolonky *Vklad jménem* a pošlete tajemníkovi jmenný seznam. Pokud posíláte peníze za sebe, **zopakujte v této kolonce své jméno**. Velmi důležitý je pro určení platby variabilní symbol - číslo (5-místné), které je buď stálé (viz seznam) nebo bude vždy uvedeno na pozvánkách nebo v inf. článku ve Startu. Konstantní symbol je 0379 při platbě v hotovosti. Pokud platíte bezhotovostně ze svého účtu, je konstantní symbol 0308. Seznam čísel:

**06940** členství ČES
**06941** členství UEA
**06942** předplatné Starta bez členství
**06943** dary ČES
**06944** zápisné do Odborné knihovny ČES.
**50200** sekce železničářů
**50400** komise pedagogická
**50401** písemný kurs začátečníci
**50402** písemný kurs pokročilí
**50403** členství ILEI
**50404** Paroliga kurso
**50405** svazové zkoušky
**50500** sekce přátel SAT
**50600** sekce šachistů EŜLI
**50800** sekce nevidomých LIBE
**50900** sekce zdravotníků UMEA
**51000** sekce křesť. esp. KELI
**51100** sekce katol. esp. IKUE
**70100** komise pro tisk a inf.
**80200** ediční fond
**80300** propagace v tisku
**80400** fond Tilio

Pro jistotu napište tajemníkovi svazu, kdy a kolik jste platili - máme řadu neurčených plateb, a to na různé akce, členství ČES, ale i na členství UEA.

## Jak poslat peníze do zahraničí?

Pokud chcete zaplatit knihu, předplatné časopisu, účastnický poplatek apod. do zahraničí, pošlete peníze **mezinárodní složenkou MP1**, kterou si vyžádáte na poště.

**Periodikum Českého esperantského svazu (35. ročník)**
**Redaktor: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, malovec.starto@clavis.cz; www.clavis.cz/starto**
**Členská evidence a změny adres: Pavel Polnický, ČES**

**Uzávěrka dalšího čísla**: 7.5.2004

**Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio (35-a jarkolekto)**
**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio**
**Abonprezo: 10 eŭroj (se aerpoŝte: + 2 eŭroj)**
**Redaktoro: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, Ĉeĥio, e-mail: malovec.starto@clavis.cz; www.clavis.cz/starto**
**Presis: HRG Litomyšl**

**Redaktadfermo de la sekva numero**: 7.5.2004

**ISSN 1212-009X**

**TOTO číslo Starta je poslední, které dostávají členové, kteří ještě nezaplatili členský příspěvek v nové výši na rok 2004 !!**

## Neurčené platby

Dostali jsme několik plateb, u nichž nevíme, komu patří, protože plátce nezopakoval své jméno v kolonce **Vklad jménem** (viz instrukce na předposlední straně). Na výpisu z banky pak není plátce uveden. Pokud poznáte svou platbu, ozvěte se tajemníkovi (viz záhlaví, str. 2).

| | |
|---|---|
| členství ČES - | 6. 2. 04 - 300-. Kč (zřejmě kat. A) |
| | 17.2.04 - 200,- Kč |
| členství UEA - | 9. 12. 03 - 1100.- Kč |
| členství IFEF- | 24. 11. 03 - 300.- Kč |
| | 22. 01. 04 - 300.- Kč |
| členství KELI- | 30. 12. 03 - 330.- Kč |

**Upozornění:** Vzhledem k tomu, že bankovní poplatky jsou vysoké, můžete platby svazu platit jednou položkou (např. člen. ČES + UEA + dar nebo expedice knih), ale v tom případě je nutné poslat tajemníkovi rozpis plateb!!!